

Sekso kaj Egaleco

Numero 2

Aprilo 1980

Sendependa
novajletero

K I O K A J E G A L E C O ?

De kelkaj legantoj kaj interesatoj venis malaprobaj reagoj, ne al la enhavo de la "nula numero" de SkE, sed al ĝia titolo, pli precize ties unua vorto. Tiuj reagantoj evidente atribuis al la vorto "sekso" sencoon vaste rekonblan - ĉefe pro la internacia uziĝo de la parenca vorto sex (kredeble laŭ la angla) - sed ne ortodokse esperantan.

Oni de tempo al tempo aŭdas frazojn kiel "La filmoj nuntempe estas plenaj je sekso kaj perforto", aŭ "Tiu libro enhavas multe da sekso", aŭ eĉ "Ili enlitiĝis kaj ĝuis sekson". Ĉu tiuj vortuzoj estas bonaj?

Plena Ilustrita Vortaro donas al la vorto sekso kvar difinojn: "1 Korpa k fiziologia ecaro, karakterizanta la unuopajn individuojn de vegetala aŭ animala specio kiel virajn aŭ virinajn, k ebliganta, ke ili kune reproduktu k konservu la specion... 2 La organo, ĉe kiu evidentiĝas tiu diferenco. 3 Tutaĵo de la homoj, apartenantaj al la sama sekso... 4 (arkaike) Genro." Laŭ tiuj difinoj, la cititaj frazoj fariĝas sensencaj.

Ĉu la frazoj estas tradukeblaj al bona Esperanto? Kompreneble, ke jes. Pri artverko, kiu ekscitas seksajn pasiojn (aŭ ja la seksorganojn de la ĝuantoj), oni diru, ke ĝi estas lasciva, pornografia aŭ sekse stimula - laŭ onia gusto kaj morala starpunkto. Pri agado per la seksorganoj ekzistas en Esperanto multaj terminoj, eĉ se ne menciitaj metaforoj, en kaj ekster PIV, kun diversaj signifoj kaj sub-

Sekso kaj Egaleco

Sendependa novaĵletero

Redaktoro

Anna Brennan
p/a Nieuwe Binnenweg 197B
3021 GA Rotterdam
Nederlando

Kunlaborantoj

Audrey C.E. Childs-Mee
Prabai Dasgupto
Loes Demmendaal
Charles Power
Dermod Quirke

Limdato por la venonta numero:
1-a de junio.

Jerabono (4 numeroj)
8,00 glđ. aŭ 10 irk.

Sendu internaciajn respondu-
buonojn rekte al Anna Brennan,
aŭ pagu al Sia nederlanda
poŝtĉekkonto, n-ro 4112754.

Perantoj

Brita (Prezo: £2,50)
Dermod Quirke
13 Trouville Road
London SW4 8QL.
Ĝirkonto n-ro 12 463 0006.

Norvega (Prezo: 21 norv. kr.)
Margrete Landmark
Euerstad
N-3135 Torød.
Poŝtĉekkonto n-ro 5 73 61 29.

Usona (Prezo: \$4,25)
Charles Power
Nieuwe Binnenweg 197B
3021 GA Rotterdam
Nederlando.
(Pago per ordinara enlanda usona
ĉeko al la nomo Charles Power.)

komprenoj: amoro, eroto, kopulacio, koito, fiki, seksumi
(dankon, Majstro, pro tiu magia afikso), orgasmo, ejakuli
ktp. (Eĉ: ami.)

Pri tiu speco de afero do SkE ne temas.

Aŭ ĉu?

Nu, mi esperas, ke tiaj temoj ne estos tabuaj en ĉi tiu no-
vaĵletero. La korpaj seksrilatoj ja estas la kaŭzo de la
ekzisto de la seksoj, kaj la sinteno al (ni diru) la amoro
grave influas ankaŭ aliajn rilatojn inter la seksoj - eĉ,
laŭ iuj teorioj, ĉiujn homajn rilatojn. Cetere, la socia
malegaleco de la seksoj havas ofte malbonan efikon sur la
ĝuadon de la amoro - eble pli ofte, sed certe ne ekskluzi-

-p5

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

Dum la pretigo de ĉi tiu numero de la novaĵletero, alvenis ekspresa letero el Japanujo. Ĝi petas permeson eldoni japanlingvan version de SkE. La letero venis de du 30-jaraĝaj japaninoj: Yamakawa Setsuko, kiu estas mezlerneja instruisto de la angla, kaj Hukunaga Makiko, kiu estas redaktoro ĉe eldonejo de infanaj libroj.

Ili skribis, ke la provnumero de SkE impresis ilin kiel unika ĉar ĝi estas kaj efika komunikilo por la virina movado kaj utila prezentilo de Esperanto. Ili volas uzi SkE por ebligi internacian agadon de ne-esperantistinoj pere de Esperanto. Tio samtempe montrus la valoron de la lingvo.

Laŭ ili: "Ni kredas, ke la enhavo de Sekso kaj Egaleco pruviĝos interesa kaj instrua ankaŭ al japanaj ne-esperantistinoj, kiuj okupiĝas pri la problemoj de seksa diskriminacio. La japana gazetaro, inkluzive de diversaj gazetoj pri virinaj problemoj, informas tre malmulte pri eksterlandaj situacioj escepte de la virino-liberiga movado en Usono. Sekso kaj Egaleco, en japana traduko, prezentos pli larĝan perspektivon al japanaj ne-esperantistinoj.

"Ni esperantigos kaj sendos al vi opiniojn de japanaj ne-esperantistinoj por ebligi al ili partopreni en internacia diskutado. Tio certe helpos al pliriĉigo de la originala Sekso kaj Egaleco."

Yamakawa kaj Hukunaga jam komencis prepari sian provnumeron, kiun ili intencas disdoni senpage. La postajn numerojn ili vendos je kostoprezo, senprofite. Krom tradukojn el nia esperanta versio, la japana eldono enhavos raportojn pri la reago de japanaj legantoj. Ne aperos tiuj artikoloj, kiuj koncernas nur esperantistojn, kvankam oni ja tradukos interalie la diskuton pri la pronomo demando, kun la necesaj klarigoj por ne-esperantistoj.

Jen neatendita defio por nia novaĵletero! Certe la kontribuo de japanaj ne-esperantistoj multon faros por riĉigi la enha-

von de SkE. Interalie la konstato, ke ili legas nian novaĵleteron, malhelpos tendencon al "Eŭro-centrismo" - tio estas la emo supozi, ke la eŭropa kulturo estas la normo por la tuta mondo.

Unu tuj konstateblan rezulton de la japana influo vi rimarkos jam nun. Ni estas petitaj aldoni transskribojn de personaj nomoj, por ke niaj kunlaborantoj sciu, kiel skribi ilin per japanaj literoj. Kie ni sciis la ĝustan prononcon, ni mem aldonis transskribojn en ĉi tiu numero. Estonte, skribante al SkE, bonvolu ĉiam indiki la prononcon de via nomo post la nacilingva literumo.

Nia movado provizas sufiĉe ŝirmitan merkaton por eldonaĵoj kiel SkE. Ĉu ĝia enhavo estas tia, ke ĝi sukcesos teni la intereson de legantoj ankaŭ en la pli vasta mondo? SkE dependas ĉefe de kontribuado de ĝiaj legantoj. Evidente, ju pli da legantoj, des pli varia kaj diversa la enhavo. Necesas do larĝigi nian legantaron per varbado - kaj por tio ni bezonas vian helpon. Multaj homoj ankoraŭ ne aŭdis pri SkE, malgraŭ bona prezento en aliaj esperantaj revuoj. Anoncu SkE en via loka grupo kaj ĉe renkontiĝoj. Ni povas provizi limigitajn kvantojn da varbekzempleroj kaj aboniloj. Petante tiujn, bonvolu indiki deziratajn kvantojn.

ab

KVA

Virinoj en Esperantujo

"Ĉu ekzistas diskriminacio kontraŭ virinoj en la Esperantomovado?" Tio estas unu el la demandoj, kiujn ni planas diskuti dum la traktado de la kongresa temo en Stokholmo ĉi-somere (vidu la lastan numeron de SkE, p. 14-15). Pri kelkaj el la aliaj diskutotaj demandoj ni tradukigas artikolojn en Esperanton, sed pri tiu temo ni ne konas taŭgan materialon. Ĉar laŭ nia scio ne jam troviĝas studoj pri ĝi, ŝajnas ke ni devos mem krei ilin. Ni ne povas nun fari tion tre sisteme, sed almenaŭ eblas proponi kelkajn specifajn demandojn, kiujn vi povus konsideri prepare al la Kongreso (jam antaŭ la Kongreso ni ĝojus ricevi viajn opiniojn). Eble la faktoroj, kiujn ni mencias ĉi-sube, ne ŝajnas al vi

la ĉefaj. En tiu okazo ni volonte ricevus viajn aliajn sugestojn. Ni restas malfermaj al ĉiuj ideoj!

1. Gvidantaj virinoj. Kiuj estas la plej bone konataj virinoj en la internacia Esperanto-movado kaj en via loka aŭ nacia movado? Kiom da efektiva potenco ili ĝuas, kaj kian? Kiuj faktoroj en iliaj personecoj aŭ vivsituacioj ebligas al ili sukcesi? Kio malhelpas, ke aliaj virinoj atingu similan nivelon?

2. Esperanto-literaturo. Kiel virinoj estas prezentitaj en la Esperanto-gazetaro, -lernolibroj, -beletraĵoj? Ĉu tiuj fontoj emas pli fortigi la seksajn stereotipojn? Kie virinoj estas prezentitaj laŭ pozitiva maniero? Ĉu ekzistas iuj elstaraj inaj rolantoj en la Esperanto-literaturo?

3. Loka kaj nacia agado.

- Kiuj estas la proporcioj de viroj/virinoj? Ĉu unu sekso pli ol la alia emas forfali el Esperanto-agado? En kiuj proporcioj la seksoj troviĝas en gvidaj pozicioj?
- Kiuj faktoroj ludas rolon en la agado de membroj de via grupo? (Kelkaj sugestoj: aĝo, sekso, geedza stato, infanoj..... Ĉu ekzistas aliaj?) Kiel tiuj faktoroj influas la regulan vizitadon al la grupo kaj partoprenon en ĝia agado?
- Kiel personaj kaj seksaj rilatoj influas partoprenon en la grupa agado?
- Ĉu viroj aŭ virinoj kutime havas pli bonan lingvoscion? Kial? Kiu pli parolas dum renkontiĝoj?
- En via loka/regiona grupo, ĉu virino aŭ viro kutime: prezidas? sekretarias? gvidas diskutojn aŭ prelegas? pritraktas eksterajn rilatojn? preparas la programon? prizorgas trinkaĵojn ktp?
- Ĉu troviĝas pli da viroj aŭ da virinoj ĉe la pli alta nivelo de la Esperanto-instruado kaj studado?


ab/ld

KIO KAJ EGALECO? - daŭrigo de p. 2

ve, ĉe la virino. Ankaŭ tio meritas esploron.

SkE do ne celas fariĝi pornografia revuo, nek gvidilo pri la amora arto. Ĝi estas kaj restas revuo pri - sekso kaj egaleco.

Charles Fower (Ĉarlz Paŭr), Nederlando



Mankis spaco en la unua numero de SkE por aperigi ĉiujn reagojn pri la provnumero. Fakte, kelkaj alvenis nur post apero de la sekvanta numero. Jen do kelkaj pliaj komentoj de vi, la legantoj.

Pri la enhavo de la bulteno mi havas kelkajn perpleksojn. Unue: kial "novaĵletero"? Laŭ mi ĝi estas simple revuo, bulteno, gazeto, artikolaro, kion vi volas, sed neniakaze "letero". Due: en sia artikolo Ole Hagemann ne klarigas kial, inter la senfinaj eblecoj, li elektis ĝuste ri kiel la neŭtran triapersonan pronomon. Ni ne forgesu, ke la r estas tute nekonata al kelkaj popoloj kaj malfacile, fuŝe aŭ mise prononcata de multaj aliaj (ekz. angloj, francoj, germanoj). Kial ne bi, di, gi, pi, ti? Sed la problemo postulus multe pli longan kaj kompleksan pritrakton.

Aldo de' Giorgi (Ĝorĝi), Italujo

Volonte mi volas reagi al la artikolo de Ole Hagemann en numero 0 de SkE. Mi subtenas tute la ideon de Ole enkonduki la novan pronomon ri kiel komunseksan pronomon. Tio estus bona kontribuo al egaleco inter viroj kaj virinoj.

Kion vi opinias pri la uzado de la vorto "fraŭlino" kiel alparoltitolo? Mi neniam legis aŭ aŭdis la vorton "fraŭlo" en ĉi tiu rilato. Kial ni ne ĉesu uzi la vorton "fraŭlino"? Anstataŭ "fraŭlino" oni povas uzi "sinjorino" por ĉiuj virinoj kaj por knabinoj ekde 16 jaroj. 16-jaraj

knaboj jam estas alparolataj kiel "sinjoro". Homoj pli junaj ol 16-jaraj estas nomataj per siaj baptonomoj.

Sabina van der Hem (fan der Hem), Nederlando

Ni ricevis kaj legis kun intereso la unuan numeron de Sekso kaj Egaleco: ni multe ĝojas ke naskiĝis plia gazeto, kaj deziras al ĝi multe da sukceso.

Nia plej granda espero estas ke via periodaĵo pozitive evoluu sur la linio de serioza komparado de motivoj kaj situacioj, kaj ne perdiĝu en la marĉo de seninteresaj personaj polemikoj, kiel bedaŭrinde tre ofte okazas al generacie engaĝitaj gazetoj.

Paola Mamone, publikrilata respondeculino
Literatura Foiro, Italujo

Kun intereso mi tra legis la novaĵleteron n-ro 0 de oktobro 1979. Plaĉas al mi la sincereco de la skribintinoj kaj la variaj temoj tuŝitaj. Tuj mi komencas explore observadi virinojn kaj virojn dum komunikado.

Mi dubas, ĉu virinoj sufiĉe multnombre regule legos kaj kontribuos al la revuo, ĉar la plejmulto ja eĉ ne scias pri ĝia ekzisto. Ĉu ne estus pli rekomendinde aperigi ĝin kiel suplementon (aldonaĵon) de iu jam vaste konata kaj multnombre legata revuo?

Jen, kion mi ekde jaroj observadas:

La Esperanto-kursoj en nia popola altlernejo estas je 75% frekventataj de virinoj. Nur malmultaj viroj aperas. Tamen, en la volontulaj gvidaj funkcioj poste agadas plejparte ne virinoj sed viroj.

Unu el la diversaj kaŭzoj estas, ke virinoj akceptas funkcion nur tiam, kiam ili sentas sin 100% kapablaj. Ŝajne pro konscienco kaj ambicio. Alia kaŭzo ofte estas la okupiteco en la familio post la 8-hora labortago. Tempo kaj fortoj estas limigitaj. La plej fervoraj kaj kapablaj volontulinoj estas la pli junaj, kiuj ankoraŭ ne havas familion, la pli aĝaj, kies infanoj jam estas plenkreskaj, kaj ĝenerale "senfamiliaj" virinoj. Sed la pli junaj ofte ankaŭ estas "katenitaj" pro profesia kvalifikado.

Laŭ mia opinio, en GDR, kie egaleco estas lege garantiata, superfluas aparta virina sekcio en la Esperanto-movado. Kiam ĉiu tiras la saman ŝnuregon - tiam certe ni atingos la plej bonan sukceson.

Hella Sauerbrey (Hela Zaŭerbraj), GDR

Elkoran dankon pro via novaĵletero, kiu bonorde alvenis kaj estas tre interesa laŭ enhavo. Ĝi pritraktas interesajn problemojn, estas bone prilaborita kaj vere legebla. Kelkaj problemoj menciitaj en la revuo estas ne konataj por ni, sovetaĵ virinoj, ĉar ni estas tute sendependaj laŭ socia stato kaj ni en multaj vivobranĉoj havas egalajn rajtojn kune kun viroj, sed ni volas pli bone koni problemojn de virinoj en aliaj landoj.

Saulcerĭte Neilande, Latva SSR

La virina movado miskomprenas sian problemon. Tio estas mia impresio post legado de la nula numero de Sekso kaj Egaleco. Post la leĝa samrajtigo de la virino diskriminacio al la virino ne plu ekzistas.

Sed ekzistas la problemo de manka memfido, kaj ĝuste en tiu fakto troviĝas la problemo de multaj virinoj. Tion klare montras la diversaj kontribuoj en la nula numero. Nur tiu, kiu klare pretendas siajn rajtojn, povas utiligi ilin. Estas tro facile kulpigi la viraron anstataŭ vidi la proprajn erarojn.

Ni analizu kelkajn kontribuaĵojn! Kial E. Lapenna proponas "Virinan oratoran konkurson" anstataŭ konsideri la kialojnde manka virina kontribuado al la "Oratoraj konkursoj" por gejunuloj? Kial la virinoj sentu sin tiel malkapablaj kompare al viroj, ke ili kaŝu sin honte en iuj virinaj dumkongresaj kunvenoj? Ĉu kulpigi virojn pro la manka kontribuado de virinoj? Jes, facile! Tro facile, ĉar tiel la situacio neniam ŝanĝiĝos. Tie, kie la virinoj montras intereson je kunlaborado, ili kutime estas ja tre bonvenaj kaj laboradas tute sukcese.

Kiom mankas la memfido montras same la letero de Marianne Bückmann. Ĉu estas vira kulpo, ke la virinoj ne segas, ĉar ili mem opinias, ke tion la viroj pli bone kapablas?

Tre ofte mi havas la impreson, ke la tuta diskutado iras al tre malbona direkto. Ĉu la virinoj laboru eksterhejme? "La virinoj" same ne ekzistas kiel "la viroj". Sed ekzistas individuoj, homoj viraj kaj virinaj. Ili ĉiuj havas unu komunan gravan problemon: la problemon kiel plej bone evolui, kiel disvolvi siajn kapablojn, kiel kreskigi sian memfidon. Tiun problemon ni komune solvu, sen ke iu ajn premu nin en novajn rolojn. Ĉiu homo decidu mem pri sia destino. Mi ĉiam estas tre skeptika, se iu alia batalas por mia bono asertante ke ĝi konus kion mi bezonas. Do, ne premu "la virinojn" en novan korseton!

Harald Schicke (Ŝike), FR Germanujo

... mi povas gratuli vin pri Sekso kaj Egaleco, interesa kaj plena de bonaj ideoj. Nur la propono enkonduki ambaŭseksan pronomon ri ŝajnas al mi nekonsilinda; kial ne li-ŝi?

Albert Goodheir (Gudher), Britujo

Bonorde mi ricevis la n-ron 0 de Sekso kaj Egaleco. En akordo kun linioj viaj el la unuapaga prezento: "Ili argumentis, ke la virinoj ne devus konsideri sin speciala grupo, sed agi en la kadro de la ordinara socio, senzorge pri sia sekso. Tiu reago venis precipe de virinoj, kiuj mem sukcesis tion fari." Vi mem, prave, lokis mian propran alportadon en tiu kadro.

Ĉi-supre, mi substrekis "devus". Ja, ĉu ĉiuj povas? En tiu demando kuŝas la problemo. Do, ŝajnas ke via revuo povus esti utila al multaj. Kun plezuro mi legos la venontajn numerojn.

Berengère Cheverry (Beranĝer Ŝeveri), Francujo

ŜANĜU NIAJN MONOLOGOJN EN DIALOGOJN

Ne permesu, ke oni prelegu al vi; reskribu!

Pli da leteroj sekvas sur p. 19.

Pol- lando

Mi havas korespondanton, esperantiston en Anglujo. Kiam mi skribis la unuan leteron al li, mi priskribis ĉion pri mi mem - interalie, ke mi havas politeknikan instruitecon kaj ke mi laboras en projekta oficejo pri projektado de kablaj retoj kaj elektraj stacioj.

Mia anglo en sia respondo esprimis treegan miron; li eĉ dubis ĉu mi vere estas inĝenierino! Li sendis kun sia letero tondaĵon el angla gazeto. Parto de la tondaĵo estis granda foto. La foto montras la unuan anglinon kiu komencis labori kiel lokomotivistino veturiganta subterajn vagonarojn. Ĵurnalisto en ravaj vortoj priskribis la penon kaj laboregon, kiuj ebligis al ŝi atingi tian respondecan postenon. Mia korespondanto opiniis ĉi tiun eventon grava atingo en la historio de virina egalrajteco. Kompreneble, se pri Anglujo temas!

En ĉi tiu momento mi pensis al certa tago antaŭ dudek kelkaj jaroj, en kiu mi ricevis la politeknikan diplomon. Neniu fotis min. Neniu miris. Mankis gazetara intervjuo. Kune kun mi en mia fakultato ricevis samajn diplomojn 9 junulinoj, kaj, en aliaj lernejoj de Pollando, kelkaj miloj.

Kompreneble, en Pollando ekestis specialaj kondiĉoj post la lasta milito. Tiu terura milito komplete ruinigis nian landon kaj mortigis multe da homoj. Simple por pluvivi, ni

devis labori kaj kleriĝi. En tiu malfacila tempo, la polino deĵetas la antaŭmilitan modelon "virino ĉe edzo" kaj komencas memstare labori. En tiu etapo la virinoj penas kaŝi sian aliecon, sentemon, delikatecon. La virinoj strebas atingi kvalifikon en viraj fakoj, ili akceptas viran modelon de laboro. Kaj la simbolo de laboranta virino en tiu tempo estis do traktoristino aŭ masonistino.

De tiam ĝis hodiaŭ la polino multe ŝanĝiĝis. Nun ŝi ne plu devas labori kiel traktoristino aŭ masonistino. Komprenibile, ŝi laboras, sed ŝi jam povas elekti laboron laŭ sia deziro, plaĉo, ambicioj. Ŝi povas lerni, studi en ĉiuj mez- kaj altlernejoj laŭ siaj kapabloj. Nuntempa juna polino ne havas alian doton ol la propran kvalifikaron kaj pozicion.

Oni povus opinii, ke maleblas ludi samtempe la tri gravajn rolojn de edzino, patrino kaj laborantino en ŝtata ekonomio. Komprenibile tio ne estas facila. Sed laboranta patrino, kvankam ŝi havas malpli da tempo por sia infano, edukas ĝin pli bone, ĉar ŝi havas pli larĝan horizonton, pli multajn interesojn, pli bonan psikan kontakton kun la infano. Cetere, el la vidpunkto de la infano, pli da aŭtoritato havas patrino, kiu scipovas ne nur lavi, kuiri kaj purigi, sed ankaŭ fake labori tiel same bone kiel la patro.

Krome, laboranta edzino estas ankaŭ pli bona kamarado de sia edzo, kamarado pri kiu oni devas kalkuli. La fake laborantaj virinoj estas pli aktivaj kulture, socie, politike. La virinoj ludas la plej gravan rolon en la formado kaj disvolvo de la kulturo, en la formado de la plej intima medio - la familio.

Malgraŭ ke multe da virinoj fake laboras, malmultaj atingas la estrajn postenojn. Estas nur unu kialo: la pli multaj virinoj rezignas pri atingo de pli altrangaj pozicioj, ĉar ili volus havi pli da tempo por eduki la infanojn, kaj oni supozas, ke tiu ĉi eblec elekti estas la plej grava por ĉiu homo, precipe por virinoj.

Mi deziras al ĉiuj virinoj en la tuta mondo similan eblecon, eblecon decidi pri la propra vivo kaj pri la maniero vivi ĝin.

Zofia Borowiec, Pollando

Alilandaj Kaj...

La unua virina radio en Aŭstralio aŭdiĝis en decembro pasintjare en Brisbane. Elsendis la programon la Etna Elsenda Asocio de Queensland, kiu ricevis sian licencon kondiĉe ke ĝi donu elsendo-tempon ankaŭ al la malsukcesaj kandidatoj, kiuj inkluzivis Virinan Radion. Virina Radio ankoraŭ klopodas ricevi la propran licencon, sed intertempe ĝi elsendas dufoje semajne po unu horo.

Virina Radio celas prezenti kurantajn publikajn demandojn al hejmrestantaj virinoj, por plilarĝigi la komprenon, kiu mankas al multaj virinoj rilate publikajn aferojn. La prezentantoj esperas ke tiel ili donos al virinoj pli da memfido por diskuti bezonatajn ŝanĝojn.

El la 37 komitatanoj nomitaj de la Landaj Sekcioj de TEJO, 13 estas virinoj - do iom pli ol 35% de la tuto. La sekretario de TEJO kun fiero raportas tiun konstaton kaj komentas, ke okazas evoluo en la ĝusta direkto. Ŝajne li pravus, ĉar el la 70 komitatanoj de UEA, nur 13, aŭ 18,6%, estas virinoj.

Ekde decembro 1979 aperas en Sovetunio feminisma periodaĵo kun la titolo Almanako, por virinoj kaj de virinoj. Ĝia redakta kolektivo en Leningrad emfazas en sia ĉefartikolo, ke necesas en Sovetunio virina li-

berigo, kiu baziĝas sur la tiurilatataj atingoj de la Oktobra Revolucio de 1917, kaj kiu rilatas al la nuntempa monda situacio. La kolektivo rigardas kiel unu ĉefan problemon la fakton ke "la valorsistemo de la socio restas vira" - ke oni taksas la virinojn laŭ tio, kiom ili similas al viroj.

La artikoloj de individuaj kontribuintoj havas sufiĉe personan aspekton tiel laŭ formo kiel laŭ enhavo. Laŭ formo, ĉiu artikolo estas akompanata de foto de la aŭtoro kaj tajpita per malsama tajpilo. Euhave, oni diskutas jen la alkoholismon, je la labordividon, jen eĉ ies novan fidon al la Sankta Virgulino Maria.

Kiel ĉe alilandaj feminismaj revuoj, la periodaĵo celas ebligi pli intiman kontakton inter aŭtoroj kaj legantoj. Aliflanke diference de okcidentaj revuoj pri tiaj temoj, oni ne diskutas seksajn rolojn aŭ konsideras aranĝojn ne bazitajn sur la familio.

La sciencfikcio estas literatura ĝenro kie, en pli fruaj jaroj, viroj verkis por viroj - eĉ pli grandproporcie ol en la literaturo ĝenerale. Unu elstara verkistino, Catherine L. Moore, dum jaroj aperis nur kiel "C.L. Moore" por kaŝi sian sekson. La populara magazino Playboy eĉ en 1969, aperigante novelon de Ursula K. LeGuin, insiste uzis la formon "U.K. LeGuin".

Tio draste ŝanĝiĝis dum la lasta jardeko. Meze de la sepdekaj

jaroj, la konata sciencfikcia verkisto Theodore Sturgeon rimarkis en prelego, ke la plej interesaj novaj verkistoj en la ĝenro ŝajne ĉiuj estas virinoj, kun escepto de James Tiptree, Jr. Kelkajn monatojn poste, "Tiptree" montriĝis pseŭdonimo de d-ino Alice Sheldon.

En 1979, el la kvin titoloj proponitaj kiel plej bona romano por la premio "Hugo", kiun voĉdonas aliĝintoj al la Monda Sciencfikcia Kongreso, kvar estis de virinoj, inkluzive de la gajninto, Songoserpento de Vonda N. McIntire. Tiu sama romano gajnis ankaŭ la premion "Nebula" de la asocio Sciencfikciaj Verkistoj de Ameriko, kiu aljuĝis duan lokon al La paliĝinta suno: Kesrit, kies aŭtorino estis C.J. Cherryh.

En pluraj lastaj numeroj de la revuo Budapeŝta Informilo aperis anonco pri "interesa laboro" en iu fabriko de medikamentoj. Ekzistas tie eblecoj por profesia lernado de fakoj: laŭ la anonco "Knaboj povas anonci sin metilernanto pri fakoj medikament-fabrikista (kemiista), serurista, veldista, elektrista, tornista, tubomuntista. Knabinojn ni akceptas pri fako medikament-fabrikista (kemiista)."

Supozeble tiu fabriko ne havas tre altan proporcion da virinaj laborantoj. Surprize, ĝuste unu oni elektis por aperigo en la bildo.

En la danlanda balotado la 23an de oktobro 1979 la kandidatinoj

ricevis meznombro 1723 prefervoĉojn, superante la meznombro 1272 por virkandidatoj. Tamen, en la dana parlamento estas 549 viroj kontraŭ nur 248 virinoj. Kial tio okazas? La balotantoj evidente mem favoras virinojn. Precipe du faktoroj malhelpas sukceson de virinoj ĉe la balotado. Unue, estas multe da voĉdon-kvartaloj, kie ne ĉiu partio kandidatigas virinojn. Due, la sistemo donas preferon al kandidatoj en la komenco de la kandidat-listo, kiuj ĝenerale estas viroj. Propono de Dana Virina Asocio pri reformo en la sistemo forigus tiujn mankojn.

Laŭ la usona inisma revuo Ms., enketo pri la gustoj de japanaj viroj montris, ke por ili la plej alloga trajto de virino estas la voĉo. Japanaj virinoj laŭkutime parolas unu oktavon pli alte ol viroj kaj uzas inajn vortformojn. Per sekretaj sursonbendigoj de iernejaninoj, tamen, oni konstatas ĉiam pli oftan uzon de la pli aŭtoritataj viraj vorto- kaj demandoformoj.

Informojn por ĉi tiu rubriko provizis: Winsome Greenhalgh, Aŭstral.; Thomas Bormann (Thomas Borman), FRG; Charles Power (Ĉarlz Paŭr), Ned.; Werner Bormann (Verner Borman), FRG.



Kion faras

NIA JARDEKO?

Ni nun troviĝas ĉe la meza punkto de la UN-Jardeko por Virinoj, anoncita dum la Internacia Jaro de la Virino en 1975. Kion la virinoj atingis dum tiuj 5 jaroj? Ĉu entute ilia pozicio pliboniĝis? Aŭ ĉu fakte la proklamado de tiu jardeko estis nur retorika ekzerco, sen iu ajn rilato al la efektiva situacio?

Por studi la konkretajn atingiĝojn de la unua duono de la UN-Jardeko por Virinoj, 1976-1985, kaj por plani programon de specifa agado por la venontaj 5 jaroj, renkontiĝos en Kopenhago la Universala Konferenco pri la Jardeko, je la 14a - 30a de julio ĉi-jare. Partoprenos la Konferencon reprezentantoj de registaroj, instancoj de UN, inter-regis-

PRI EVOLULANDOJ, EKZEMPLE?

KION SIGNIFAS modernigo de la vivnivelo en la evoluantaj landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko? - Kompreneble, forigon de nekonvenaj aranĝoj, de malriĉeco, de problemoj nutraj kaj higienaj.

SED ĈU oni memoras, ke 50% el la loĝantoj estas virinoj? - Bedaŭrinde, fakuloj pri evoluigo supozas, ke nur viroj, kiel "famili-estroj", ricevu evolu-avantaĝojn: monon, laboron, krediton ktp.

ĈU VERE estroj de familioj ĉiam estas viroj? - Ne! En Kenjo triono de la kamparaj familioj havis virinan estron en 1969; estis eĉ pli alta proporcio en Lesoto.

KIEL FUNKCIAS evolu-planoj bazitaj sur la antaŭjuĝo ke nur viroj estras familiojn? - Katastrofe! Familioj foje estas transplantitaj en mediojn, kie la virinoj ne povas fari sian tradician laboron. Rezulte, la virino fariĝas servisto de la edzo, kiu sola ricevas pagon (eĉ pro ŝia laboro!)

ĈU OKAZOS pli racia planado, preter maltrafaj antaŭjuĝoj?

taraj kaj ne-registaraj organizaĵoj. Al tiu lasta kategorio apartenas UEA, kiu estos reprezentata de Eliza Kohlet, antaŭa membro de la Komisiono pri Virina Agado.

La Konferenco ekzamenos la efektivan progreson kaj la renkontitajn obstaklojn rilate plenumon de la Universala Agadplano akceptita en 1975. Ĝi ankaŭ projektos agadplanon por la venontaj kvin jaroj, kiu specife emfazos la kampojn de laboro, sano kaj edukado. Fine, ĝi studos la efikon de apartismo (apartheid) sur virinojn en ŝuda Afriko, kaj proponos rimedojn por helpi ilin.

Jam okazis serio da pretigaj regionaj kunvenoj, por ekzameni la problemojn de virinoj en ĉiuj partoj de la mondo kaj por proponi programojn por la dua duono de la Jardeko.



Lucille Mair

Ĝenerala Sekretario de la Konferenco estas Lucille Mair el Jamaiko, kiu antaŭe estis jamaika ambasadoro al Kubo kaj reprezentis sian landon ĉe multaj UN-konferencoj, inkluzive la Universalan Konferencon de la Internacia Jaro de la Virino, kiu okazis en Meksiko en 1975. Unu el ŝiaj taskoj kiel Ĝenerala Sekretario estas starigi sekretariaton por prepari por la Konferenco.

Aŭstralio pretiĝas

Intereso leviĝas en virinaj grupoj en Aŭstralio pri la Provplano por Agado eldonita de la Virina Konsilantaro, organizaĵo starigita de la Federala Registaro por prezenti la vidpunkton de virinoj.

Pretige por la Universala Konferenco 1980 por virinoj, virinaj grupoj kunvenas por diskuti la Aŭstralian Provplanon, por ke la ideoj prezentotaj en Danlando de nia delegacio konformu al la opinioj de larĝa spektro da virinoj.

La Provplano estas priskribo de principoj kaj celoj por atingi egalajn viveblecon kaj rangon por virinoj kaj la forigon de diskriminacio kontraŭ ili. Ĝi direktiĝas ne nur al registaroj. Krome, privatajn instancojn, komunumojn, organizaĵojn, sindikatojn kaj komercajn entreprenojn ĝi instigas atenti la demandojn, kiuj gravas al virinoj kaj al la socio. Tiuj demandoj postulas agadon por levi la rangon de virinoj kaj starigi pli justan kaj racian socion por ĉiuj. En la Provplano troviĝas rubrikoj pri komunikado inter virinoj, atencoj kontraŭ ili, komunikiloj (gazetoj, radio ktp), virina partopreno en la farado de gravaj decidoj, edukado kaj klerigo, laboro, la familio, prizorgo de la hejmo, sano, handikaphavaj virinoj, sociala bonfarto, kamparaj indiĝenaj kaj enmigrintaj virinoj, aliro al financo, internaciaj aferoj, kaj scienca esplorado.

Multaj aŭstralianinoj kontente vivas kvazaŭ ornamaĵo al la ofico de sia edzo, kaj neniam pripensas la pozicion de virinoj en la socio. Nur kiam ili vidviniĝas, aliĝas al la laboristaro aŭ vidas siajn filinojn ekspluatataj aŭ endanĝerigataj, ili konsciiĝas pri la malavantaĝoj de virinoj. Oni esperu ke la nuntempa aktiveco levos la konscion de niaj virinoj tiel ke ili kuniĝos kun alilandaj fratinoj por havigi egalecon, sekurecon kontraŭ perforto, kaj liberecon elekti la propran vivstilon, al ĉiuj virinoj ĝie.

Grace Kirkwood (Crejs Kerkŭud)

VIRINAJ AFEROJ, ĈU JAM FORGESITAJ?

En la lasta numero de SkE, Märtha Andréasson aludis al "internacia intervjuo" entreprenita de ŝia klubo en Kungälv, Svedujo. Jen ŝi plu klarigas:

Antaŭ kelkaj jaroj, en la fino de la Virina Jaro, nia klubo faris intervjuon mondiskalan pri kiel statas la situacio de la virinoj en diversaj landoj. Samtempe ni helpis distribui monden la esperantigitan broŝuron de SIDA (la sveda ŝtata instanco por evoluhelpo) pri la sveda komitato por seksa egalrajteco.

Ni elsendis ĉ. 200 enketilojn al pli ol 70 landoj. Bedaŭrinde nur malgranda parto revenis, ĉ. 30 el 14 landoj. Tamen la respondoj, kiuj revenis, estis interesa legaĵo kaj ni dankas ĉiujn kunlaborantojn. Estis respondoj el Hinda Unio, Argentino, Venezuelo, Nov-Zelando, Usono kaj Israelo ekster Eŭropo kaj la ceteraj el nia propra kontinento. Do, ni povas diri, ke ni estas kontentaj pri la kvalito de la respondoj sed ne pri la kvanto.

Oni konstatas, ke la situacio por la virinoj ĉie pliboniĝis (almenaŭ en tiuj landoj de kie venis respondoj) sed ankaŭ, ke ŝi ne estas kontentiga. Tial necesas daŭre atentigi pri la afero. Ni ne silentu nur ĉar finiĝis la Virina Jaro. La batalon por la virinaj rajtoj ni virinoj mem devas gvidi kaj ni povos helpi kaj apogi unu la alian. Multo restas farenda.

Nun kelkaj voĉoj el nia enketmaterialo:

Venezuelo: (respondas 58-jara vira kuracisto)

... Grandaj diferencoj ekzistas inter diversaj sociaj tavoloj. En la supera socio la situacio por la virino estas bona, malgraŭ ke nia puna kodo estas antikvega.

Ekz. oni ĝuste nun provas ŝanĝi la leĝon pri la uxorcido (mortigo de la edzino) kiu, en okazo de adulto, restas sen puno. Kontraŭ tio la mortigo de la edzo pro la sama kialo estas konsiderata kiel ordinara murdo. ... En la meza tavolo la virino estas konsiderata ĝenerale egalrajta ... sed en la malalta socia tavolo, aparte en la kamparaj regionoj, ekzistas multaj forlasitaj virinoj...

Israelo: (respondas virino, aĝo nekonata)

... Fakte, la pozicio de virino spegulas la kulturan kaj civilizacian nivelon de tiu ŝtato, en kiu ŝi vivas. Israelo, kiel demokratia lando, memkompreneble traktas dece ankaŭ la virinon ... Rilate la senditan faldfolion eldonitan de SIDA, mi absolute protestas kaj malkonsentas la ofendan prezenton de la virino ... Sur kiu bazo oni konstatas ke: "Virinoj estas daŭre subpremataj ĉie en la mondo"? Ĉu tio veras? Krom en Afriko kaj kelkaj islamaj landoj, la virinoj ĝuas la liberecon. Kiacele ni devas tiel humiliĝi, des pli ke la realo estas tute alia? ... La virino estas fizike kaj spirite pli forta, regante nerekte kaj zorgante pri ĉiuj bazaj necesajoj de la viro ...

Hinda Unio: (respondas mezaĝa dommastrino, kiu ankaŭ estas instruistino pri Esperanto kaj dancarto)

... Ekde kiam Hinda Unio liberigis de la brita regado, nia registaro klopodegas liberigi virinojn de aĉaj kutimoj per kiuj ili estas subpremataj. Nia registaro forigis la doton, devigas ĉiujn doni saman pagon por sama laboro, ĉu temas pri viro ĉu pri virino. Malgraŭ la leĝoj, bedaŭrinde nia socio ankoraŭ ne estas progresinta. Eĉ nun, la patro de fraŭlino elektas edzon por ŝi. Li komparas la horoskopojn de la gejunuloj kaj elektas laŭ tio... La novedzino estas superregata de siaj boparencoj, ŝi ne havas voĉon en la familiaj aferoj. ... La menso de multaj viroj ne estas liberala. Ili opinias, ke la edzino ne povas gajni eĉ moneron, krom eble per prostituo ... Malgraŭ la ĝenerala tipo de viroj priskribita ĉi tie, ni trovas en Hinda Unio la plej bonajn sinjorojn de la mondo ...

En tiu eta raporto eblas doni nur fragmentojn de la respondoj. Se vi interesiĝas ricevi la tuton, kiu konsistas el 19 A4-formataj paĝoj, vi povas sendi 5 sved. kronojn (aŭ 3 irk.) al poŝtĉeka konto 719350-1 Kungälv's Esperantoklubb, c/o I. Öhwall, S-425 34 Hisings Kärra, Svedujo. Skribu vian

mendon rekte sur la ĝirilon. Se vi anstataŭe pagas per internaciaj respondkuponoj, vi povas mendi de Kungälv's Esperantoklubb, c/o Märtha Andréasson, 2265 Tolsered, S-425 90 Hisings Kärra. La raporto ekzistas en la sveda kaj Esperanto.

Ni volonte akceptos pliajn kontribuojn al nia enketo. La demando neniam malaktualiĝos. Enketilojn vi ankaŭ povos ricevi de la supra adreso.

Märtha Andréasson, Svedujo

Pli da leteroj

Se vi havas bonan kunlaborantinon en Belgio, petu ŝin informiĝi pri la agado de la "liberiĝintaj balailoj". Ne ridu! Estas tute serioza afero kaj laŭ mia opinio sufiĉe unika. Temas pri 80 purigistinoj kiuj estis dungitaj de puriga entrepreno universitata. Senaverte la ĉefo decidis kvazaŭ subdungi ilin al kolega entrepreno en alia loko. La inoj estus havintaj multe pli malbonajn laborkondiĉojn, ĉar la veturigadon tien per buso la nova ĉefo ne volis pagi. La inoj tuj decidis striki kaj dum du semajnoj nur diskutis pri la nova situacio. La rezulto estis unuanima opinio, ke ili tute ne bezonas ĉefon, kaj tuj ili iris al la ĝisnuna por maldungi lin. Ili proponis daŭrigi la laboron al la universitato, kiu post komenca hezito akceptis. Mankis en la komenco la elektraj laboriloj, kiuj apartenis al la entreprenisto, sed post kelkaj monatoj ili povis aĉeti proprajn. Ĉiuj inoj ankoraŭ ricevas la saman salajron. La gvidantinojn oni elektas ĉiujare. La aranĝo daŭras nun jam pli ol 4 jarojn kaj bone funkcias. 6 viroj kunlaboras tie kiel fenestro-purigistoj. Ili perlaboras iom pli, ĉar ilia laboro estas aparte malfacila.

Mi aŭdis radian elsendon pri tiu sukcesa provo emancipiĝi de tute ordinaraĵoj virinoj. Eble vi povas ekscii pli, precipe la nomon de la loko.

Margret Brandenburg, FR Germanujo

• Volonte ni ricevus pliajn informojn pri la "liberiĝintaj balailoj". Ĉu iu leganto povas helpi? •

En sia letero en Sekso kaj Egaleco n-ro 1/80 sur paĝo 6, Paul Boden el GDR raportas, ke "egalrajteco por virinoj ne plu estas temo por diskuto" en GDR. Tio estas ege bedaŭrinda fakto, ĉar la stato de egalrajteco por virinoj en GDR tre similas tiun en okcidentaj landoj. Ekzemple:

1. Ankaŭ en familioj en GDR, la kuirejo estas la laborejo ĉefe de edzinoj kaj filinoj. Okazas malofte ankaŭ en GDR, ke edzo aŭ filo leviĝas el la fotelo por ne nur helpi, sed kunlabori en la dommastrumado.
2. En gazetaj ŝercoj inoj estas - simile kiel en FRG - montrataj kiel stultaj nememstaraj ĝenulinoj. Subtenantoj de egalrajteco ne povus ridi pri tia evidenta diskriminacio - do la GDR-konscio ankoraŭ ne enradikiĝis egalrajtecon.
3. Kvankam laboras pli multe da inoj en socialismaj landoj, tamen ĉiuj ŝtatestroj kaj preskaŭ ĉiuj politikaj kaj ekonomiaj funkciuloj en GDR estas viroj.

Tiuj tri faktoj jam sufiĉas por konsili al la homoj en GDR tamen ankoraŭ diskuti pri egalrajteco por virinoj.

Thomas Bormann (Tomas Borman), FR Germanujo

Ni bezonas paroli pli multe pri sekso kaj egaleco! Tio estas certa! Mi mem spertis seksan diskriminacion kiam mi serĉis laboron. Mi havas "viran" fakon (mi estas inĝeniero pri konstruado), kaj viroj ne tro ŝatas havi konkurencon! Krome mi havas du malgrandajn infanetojn kaj estas eksedzino. Sufiĉas! Tiel multe da malavantaĝoj ĉe unu persono! Virino! Fe! Patrino! Fe! Kaj krom ĉio, eksterlandano ...

Mi deziras al vi fruktodonan laboron pri la periodaĵo. Ĝi estas bezonata!

Mira Wiechowska, Svedujo

Virseksa pronomo. Dum la Jaro de la Virino, mi decidis, ke estontece mi uzos "in" nur kiam vere gravas indiki la

sekson, simile pri "ge". Ekzemple, mi estas "bultenisto" de mia federacio, ne plu "bultenistino". Junulo atentigis min, ke devus esti vira sufikso egala al "in", kaj post kelkajara pripensado, mi daŭre opiniis, ke li pravis, kaj mi proponis "ur". (Ekz: Junulinoj pli ĝuas danci ol junuluroj. La knaboj bezonas gvidanturon.) Tio ja similas al la franca "eur" kaj angla "er" kaj "or", kies prononcoj cetere similas al "ur". Jen mia donaco al la viroj, kiuj logike batalas kontraŭ diskriminacio koncerne virojn.

Egalaj flegistoj. En Britio ĉiuj okupoj estas laŭleĝe malfermaj al homoj de ambaŭ seksoj, je sama salajro por egala laboro. Estas vere, ke malpli da virinoj ol viroj atingas la suprajn postenojn, sed tiu situacio espereble grade pliboniĝos. Nun unu flegisto el ok estas vira, kaj oni ŝanĝis la anglalingvajn nomojn por flegistoj je la diversaj niveloj en la profesio, tiel ke ili nun taŭgas por ambaŭ seksoj egale. Pli kaj pli viroj kaj virinoj ne plu estas rigide apartigitaj en britaj hospitaloj, kaj flegistinoj aprobas kiam forta flegisto (aŭ "flegisturo") povas helpi je levado de peza paciento. Ekspacientino en radio-programo pri tiu temo atestis, kiel tre simpatia "flegisturo" helpis ŝin rapide resaniĝi. Alivorte, la intermiksiĝo de la seksoj en la hospitaloj faras pli kompletan kaj fruktodonan socion. Jen interesa ekzemplo, kiel la leĝo kontraŭ seksa diskriminacio en Britio helpas en la starigo de pli justa socio.

Sybil V. Sly (Sibil V. Slaj), Britujo

Kontraŭ "epistemo"

Lingvo-uzo

Werner Bormann (Verner Borman)

Por la Universala Kongreso de UEA en Ateno 1976 mi estis komisiita fari la festprelegon. Mia temo estis la enmetado de Greklando kaj de ĝia lingvo en la jam ekzistantan

strukturen de la Komuna Merkato, sen diskriminacio. Substrekante la neceson de egaleco mi alvenis ĉe frazo de mia manuskripto, en kiu pronomo por la ĝenerala homnocio "lingva neŭtralismo" estis bezonata. Laŭ la kutimoj de multaj eŭropaj lingvoj tio devus esti "li". Sed verkante pri temo ligita al samrajteco, enprofundiĝinte en la etoson de egaleco (kaj iel sub la memoroj de la ĵus finiĝinta UN-jaro de la virino) mi sentis la neadekvatecon de tiu identigo: homo ĝenerale = li.

Meditante pri sendiskriminacia eliro mi konsultis Plenan Ilustritan Vortaron kaj tie trovis, ke ĝi uziĝas tute korekte kiel triapersona pronomo, se temas pri "estulo, kies sekson oni ne bezonas precizigi". Tio estas sama klarigo kiel tiu de Zamenhof mem en liaj Lingvaj Respondoj (n-ro 91: "Kiam ni parolas pri homo, ne montrante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon 'ĝi' ... , kaj se vi tiel agos, vi estos gramatike tute prava ..."). Do en la teksto de mia festprelego mi uzis tiuloke ĝi. En la aŭtuno de la sama jaro mi verkis la antaŭparolon por la jarlibro 1977, kaj en ĝi mi uzis nur la pronomon ĝi, kiam temis pri homo. La legantoj de tiu ĉi artikoleto bonvolu relegi tiun tekston.

Post la pretigo de mia festprelego mi eksciis, ke prof. Jonathan Pool en sia ISU-prelego dum la sama Universala Kongreso uzis kiel senseksan pronomon de la tria persono en singularo zi. En decembro 1976 Ole Hagemann proponis en la dana Esperanto-revuo Eŝo la formon ri. Kiam mi diskutis kun kolegoj la problemon, iu diris, ke li por ambaŭ seksoj iĝis tiel kutima, ke ĝi konservu tiun funkcion kaj ke por virseksa pronomo iu nova vorteto estu enkondukita. Prezentiĝis do kiel senseksaj pronomoj 1) ĝi, 2) zi, 3) ri kaj 4) li.

La tuta demando reakiris gravecon, kiam la nova statuto de UEA venis en sian finan stadion. Laŭ la malnova statuto de UEA el la jaro 1947 prezidanto estas "li" same kiel ĝenerala sekretario - kaj eĉ delegito montras ĝeneralan virseksan. Diskutoj en la Komitato pri la lingvaĵo de la statutprojekto evidentigis, ke eĉ la Zamenhofe pravigita ĝi ne estus akceptebla, i.a. ĉar la sento estis forta, ke la uzo de li por funkciulo kompreneble virseksa kaj esceptokaze tamen ankaŭ ina estas io tute natura. La minimumo

atingebla estis la propono, ke la redakta komisiono pri la nova statuto evitu "pronomojn limigitajn al unu sekso". Kiam la Komitato voĉdenis pri sendiskriminacia lingvaĵo en la statuto, por tio estis 31 komitatanoj, 7 estis kontraŭ kaj 8 sindetenis. Lerte la redakta komisiono poste ĉirkaŭiris la pronoman problemon per preskaŭ kompleta ellaso de pronomoj kun ripetoj de la koncernaj substantivoj. La legantoj de tiu ĉi artikoleto bonvolu mem legi la tekston de la nova statuto de UEA.

Eduki la homojn al sendiskriminacia lingvouzo evidente estas terure malfacila tasko. Feliĉe ni traktas tion inter esperantistoj, kiuj jam estas konsciaj pri la ekzisto de diskriminacioj pro la lingva demando, kiu ŝarĝas ilin. Kiam iuj nun strebas forigi la seksisman lingvouzon, ili faru tion decide, sed sen krei per tio plian problemon. La uzo de ĉi estas Zamenhofs kaj aprobita de PIV. Nova vorteto por senseksa triapersona pronomo estus nur neologismo, kaj la esperantistoj estas plene rajtigitaj tiujn enkonduki en kazo de bezono, sen tuŝi la Fundamenton per tio. Sed pro la premo de la kutimoj la enkonduko de nova pronomo estas apenaŭ ebla, dum Zamenhofs aplikoj de ekzistanta pronomo estus iomete pli facile altrudebla al la esperantistoj. Duoble ŝarĝi unu pronomon, ĉi, per du sencoj estus ĝene kaj povus rezultigi ambiguan. Sed tiu ioma komplikaĵo devas postrangi al la neceso enkonduki rapide akcepteblan triapersonan pronomuzon.

La seksisma pronomo ne estas io izolita. Paralela problemo estas la kutimo de la esperantistoj ĝenerale preskaŭ ĉiam diferencigi inter viroj kaj virinoj per senĉesa uzo de la sufikso -ino, tiel substrekante, ke la sama radiko, sed sen la sufikso -ino, signas nur viron. Nur pro tio oni komprenas, aŭdinte la vorton "prezidanto", ke temas ja pri viro, kun virinoj en tiu pozicio kiel esceptoj. La nuna lingvouzo estas kontraŭfundamenta! La legantoj bonvolu mem relegi en la Fundamento la signifojn de la sufiksoj kaj de la gramatikaj finaĵoj. Ili ĉiuj estas sensekse difinitaj, ekz. per "persono kiu ..." Ofte oni aŭdas, ĉefe inter junuloj, la uzon de la sufikso -ulo por viroj. Tio estas la sama aroganteco kiel uzi la vorton "homo" kaj celi nur virojn. Estas ja gaje konstrui la vortoparon "ulo kaj ino" (ambaŭ nur sufiksoj), sed tiu lingvouzo estas seksisma kaj

kontraŭfundamenta. Ulo, ano, isto, anto, ato - Ĉiuj esprimoj estas principe senseksaj, kaj se ni subkomprenas, ke temu pri viroj, ni sekvas nur la malbonan kutimon de naciaj lingvoj. John Wells traktis tiun aferon en sia libro Lingvistikaj aspektoj de Esperanto ("Mondrigardo", p. 67).

Kio momente estas farebla? Mi listigas miajn konkludojn laŭ ilia akcepteble en normalaj konversacioj aŭ en prelegoj:

- 1) kiam la distingo inter viro kaj virino ne estas nepre necesa, mi ne aplikas distingantan vorton aŭ sufikson,
- 2) por eviti la ambaŭseksan uzon de li, mi ĉiam en tiuj kazoj diras "li aŭ ŝi", kvazaŭ nova pronomo liaŭŝi,
- 3) kiam mi kuraĝas al nekutima lingvouzo, mi aplikas ĝi aludante al homoj ĝenerale,
- 4) mi kontraŭbatalas seksisman lingvouzon ĉe aliaj, tamen rezignante pri altrudo de iu el la proponitaj formoj (kiel okazis en la nova statuto),
- 5) kun atento mi sekvas la diskuton pri la pronoma demando kaj kontribuas al ĝi; se iam estus pli vaste akceptata propono, mi subtenus ĝin,
- 6) iam la seksismo ĝenerale en Esperanto devus esti plene venkita, supozeble per elimino de la sufikso -ino (ni ankaŭ ne havas sufikson uzotan kiam la priskribita ulo estas negro!) aŭ per paralela apudmeto de sameca sufikso por la vira sekso - tiam ĉiuj personocioj fariĝus tiel senseksaj kiel la vorto "pasaĝero".

Mi kredas, ke la vojo estas longa, ĝis kiam la seksismo malaperos el Esperanto. Sed feliĉe tio eblas en la inventaĵo de Zamenhof! En multaj naciaj lingvoj la sendiskriminacia lingvouzo estas simple neebla, ĉefe kiam ili havas genrojn. Kvankam en sia Proverbaro Zamenhof desegnis vere teruran bildon pri virinoj (tipa pensmaniero por la pasinta jarcento), li donis al ni lingvon, kiun ni per niaj kutimoj prenitaj el niaj naciaj lingvoj faris seksisma, sed en kiu ne troviĝas de si mem tiu diskriminacio kontraŭ la virinoj. Ni povas uzi Esperanton neseksisme kaj tamen resti plene sur la bazo de la Fundamento. Kaj tion ni faru!